Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

GE FA
STIFTUNGSFAMILIE
BSW & EWH

Numero 4 Oktobro - Decembro 2024

Historio el lumo kaj koloroj

Geschichte aus Licht und Farben



„Stacia lumo“ – novgermane „Station Light“ iluminis la stacidoman fasadon de Hamm. (vd. paĝon 3)

„Bahnhofslicht“ – neudeutsch „Station Light“ illuminierte die Bahnhofsfassade Hamm. (s. Seite 3)

Karaj gelegantoj 2
Historio el lumo kaj koloroj 3
76-a IFK en Žilina – aliĝo prokrastita 4
Inter la fontoj 5
GEFA 02.-05.10.2025 en Schleiden 7
Achim Meinel 9
Reinhard Fößmeier 10
Sebastian Kirf 11
Daŭripove tra la disciplinoj 11
GEFA-anoncoj, redakcio 12

Liebe Leserinnen und Leser 2
Geschichte aus Licht und Farben 3
76. IFK in Žilina – Anmeldung verspätet 4
Zwischen den Quellen 5
GEFA 02.-05.10.2025 in Schleiden 7
Achim Meinel 9
Reinhard Fößmeier 10
Sebastian Kirf 11
Nachhaltig durch die Disziplinen 11
GEFA-Mitteilungen, Redaktion 12



Karaj gelegantoj,

plej ofte ja nur aŭdiĝas ĝemo el la aro de atendantoj, se per laŭtparolilo estas farata anonco, kiu finiĝas per: „Ni petas pardonon.“ Kelkfoje ankaŭ iu demandas, kiel li komprenu la klarigon por la anoncata malfruo, kiu kutime venas antaŭ la pardonpeto. Tiam okaze evoluas interesaj konversacioj pri ĉio tio, kio povas bloki la laŭregulan funkciadon.

Al fervojisto, absorbinta la laŭordan funkcian staton kaj la koncernajn reguloj (kiu kuraĝas malkovri sin per komento kiel iel respondeca kaj ne tuj esti perceptata kiel „saĝfekulo“), la trafitaj personoj okaze estas dankaj, se li klarigas al ili „riparon ĉe signalilo“, aŭ kial necesas „portempe reduktita rapido sur la linio“, kiel estiĝas „malfruo el antaŭa veturo“ aŭ kial „nerajtigitaj personoj sur la trako“ ĝenas la funkcion. Tiel ne nur pasas la neplanita atendotempo sur la kajo. Tiel evoluas ankaŭ agrablaj interrilatoj kun homoj, kiuj spite ĉiun nefidindecon ĉiam ankoraŭ restis fidelaj fervojaj klientoj.

Ĉe kelkiu evidente aperas preskaŭ mediteranea trankvileco, kiel ĉe tiu sinjorino, kiu post kelkaj trakŝanĝoj kaj anoncitaj sed ne okazintaj ekveturoj kaj intera halto en la dispona stacio sian telefonparteron anstataŭ longaj klarigoj pri atendebla alveno informis: „La fervojo denove faras fervojajn aferojn.“

Tiel ĉio estis dirita.



Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

meist geht ja nur ein Stöhnen durch die Menge der Wartenden, wenn am Lautsprecher eine Durchsage gemacht wird, die mit: „Wir bitten um Entschuldigung“, endet. Manchmal fragt aber auch jemand, wie er die Begründung für die angekündigte Verspätung verstehen soll, die meist vor der Entschuldigung kommt. Dann entwickeln sich gelegentlich interessante Gespräche über alldas, was einem geregelten Betrieb im Weg stehen kann.

Einem Eisenbahner, der den betrieblichen Sollzustand und die entsprechenden Regeln noch im Blut hat (der sich traut, sich mit einem Kommentar als irgendwie Verantwortlicher zu offenbaren und nicht gleich als „Klookschieter“ wahrgenommen zu werden), sind die Betroffenen gelegentlich sogar dankbar, wenn er ihnen die „Reparatur an einem Signal“ erklärt, oder warum mit „vorübergehend verminderter Geschwindigkeit auf der Strecke“ gefahren werden muss, wie eine „Verspätung aus vorheriger Fahrt“ zustande kommt, oder warum „unbefugte Personen im Gleis“ den Betrieb behindern. So vergeht nicht nur die ungeplante Wartezeit auf dem Bahnsteig. So entwickeln sich auch nette Beziehungen mit Menschen, die trotz aller Unzuverlässigkeit immer noch treue Bahnkunden geblieben sind.

Bei manchem stellt sich offenbar eine fast mediterrane Gelassenheit ein, wie bei der Dame, die nach mehreren Gleiswechseln, angekündigten aber nicht erfolgten Abfahrten und Zwischenhalt im Betriebsbahnhof ihrem Telefonpartner statt längerer Erklärungen zur voraussichtlichen Ankunft mitteilte: „Die Bahn macht wieder Bahndinge.“

Damit war alles gesagt.

(trad. Guido Brandenburg)



Historio el lumo kaj koloroj

La fervojo en la jaro 2023 elspezis 12 milionojn da eŭroj por forigi grafitiojn kaj aliajn nedeziritajn pentraĵojn sur muroj kaj vagonoj. Ke ĝuste per kolorigo oni festas la jubileon de stacidomo, almenaŭ unuavide estas malfacile kredeble. En Hamm tio fine de Oktobro tamen okazis – ne per farbpotoj sed per lumo.

La kreaĵoj de Gregor Eisenmann, artisto el Wuppertal, estas efemeraj - liaj laboriloj ne peniko aŭ spatelo, sed fotoaparato, komputilo kaj forta videoprojekciilo. Li studis la fasadon de la stacidomo - novbaroka konstruaĵo, monumento depost 2001 – kaj dividis ĝin en zonojn, kiuj servu kiel apartigitaj ekranaj areoj. Interfenestraj kolonoj, frisoj, horloĝa lukarno: Ĉiuj fariĝu scenejoj por izolitaj aŭ komunaj bildoj aŭ filmscenoj.

Tiel preparite Eisenmann kompilis historiajn fotojn kaj animitajn grafikaĵojn, aranĝis kaj koregrafiis ilin laŭ elektronika muziko en ĉirkaŭ dudekminutan retrospektivon pri la unuaj alvenantaj vaporlokomotivoj, pri la

Geschichte aus Licht und Farben

Die Bahn hat im Jahr 2023 12 Millionen Euro aufgewendet, um Graffiti und andere unerwünschte Malereien auf Mauern und Waggons zu entfernen. Dass man das Jubiläum eines Bahnhofsgebäudes gerade mit Einfärben feiert, ist auf den ersten Blick schwer verständlich. In Hamm ist das Ende Oktober jedoch geschehen – nicht mit Farbtöpfen, sondern mit Licht.

Die Werke von Gregor Eisenmann, einem Künstler aus Wuppertal, sind flüchtig - seine Werkzeuge sind nicht Pinsel oder Spachtel, sondern Fotoapparat, Computer und ein starker Videoprojektor. Er studierte die Fassade des Empfangsgebäudes, einem neobarocken Gebäude, Denkmal seit 2001 – und teilte sie in Zonen, die als einzelne Leinwandflächen dienen sollten. Säulen zwischen den Fenstern, Friese, eine Uhrengaube: Alle sollten Bühnen sein für isolierte oder übergreifende Bilder oder Filmszenen.

Derart vorbereitet stellte Eisenmann historische Fotos und animierte Grafiken zusammen, arrangierte und choreografierte sie nach elek-



La projekciilo en la domo vid-al-vide,
der Projektor im Haus gegenüber

kresko paralela al la rolo de Hamm kiel trafika nodo, pri la tempo sub la brunĉemizuloj kaj la signo de la svastiko, pri fajro kaj detruoj dummilitaj kaj pri la resurekto el ruinoj.
Kiel jubilea aranĝo tiu evento malfruis du jarojn - pri tiu pika rimarkigo la ĉefurbestro dum la malferma saluto memkompreneble ne povis rezigni. Tamen ĝi estis impresa evento ripetita dum du vesperoj. Tiam la stacidomo reiris al la ĉiutaga rutino.

Guido Brandenburg

tronischer Musik zu einer etwa zwanzigminütigen Rückschau über die ersten ankommenden Dampflokomotiven, über das Wachsen parallel zu der Rolle Hamms als Verkehrsknoten, über die Zeit unter Braunhemden und dem Hakenkreuz, über Feuer und Zerstörung im Krieg und über die Auferstehung aus Ruinen.
Als Jubiläumsveranstaltung hatte dieses Ereignis zwei Jahre Verspätung - auf diese spitze Bemerkung konnte der Oberbürgermeister in seiner Eröffnungsrede selbstverständlich nicht verzichten. Trotzdem war es ein beeindruckendes Ereignis, das an zwei Abenden wiederholt wurde. Dann kehrte der Bahnhof zu seiner alltäglichen Routine zurück.



(trad. Brandenburg)

76-a IFK en Žilina – aliĝo prokrastita

La intertraktoj de LKK kaj la gastigonta hotelo en Žilina ankoraŭ daŭras kaj ne permesas jam publikigi fiksajn kostojn. Tial ankaŭ rigardo al la gazetoj kaj retpaĝoj ne jam povas zorgi por klareco.
Ni tamen jam eksciis, ke ne ekzistos papera aliĝilo, kaj ke nur eblos aliĝo perreta. Sekve kiu ne posedas komputilon aŭ alian aparaton kun retaliro, laŭeble jam kontaktu amikon aŭ parencon disponantan pri tiaj rimedoj, por ke li povu ĝustatempe ricevi lian helpon.

Guido Brandenburg

76. IFK in Žilina – Anmeldung verspätet

Die Verhandlungen des Vorbereitungskomitees mit dem gastgebenden Hotel dauern noch an und gestatten keine Veröffentlichung fixer Kosten. Deshalb kann auch der Blick auf die Zeitungen und Internet-Seiten nicht für Klarheit sorgen.
Wir haben jedoch bereits erfahren, dass es keine Papieranmeldung geben wird und eine Anmeldung nur über das Netz möglich sein wird. Wer also keinen Computer besitzt oder ein anderes Gerät mit Netzzugang, sollte nach Möglichkeit schon einen Freund oder Verwandten kontaktieren, der über solche Mittel verfügt, damit er rechtzeitig seine Hilfe in Anspruch nehmen kann.

(trad. Brandenburg)



Kie haveblas la plej bonaj oblato-vafloj en Františkovy Lázně?
Wo gibt es die besten Oblaten-Waffeln in Františkovy Lázně?

Inter la fontoj

Kvankam rigardo al fervoja mapo montras preskaŭ bizaran nombron de fervojaj linioj ĉirkaŭ Bad Elster, la alvojaĝo per trajno ne nepre estas facila – almenaŭ ne por ni nord-okcidentuloj. Necesus multaj trajnŝangoj kun malcertaj konektoj. Sekve parton de la vojo al la loko de la GEFA-jarkunveno ni pasigis en gruptaksio. La trupo ĉijare estis kompare malgranda. Sed kiel ni estis esperintaj, niaj ĉeĥaj geamikoj iom helpis internaciigi la araĝon kaj venis ankaŭ por propagandi la venontjarajn kongresojn en Ĉeĥio (UK en Brno) kaj najbara Slovakio (IFK en Žilina).

Kvazaŭ antaŭguston peris la taga ekskurso per aŭtobuso kaj motorvagono de Vogtlandbahn trans la limon al Františkovy Lázně. La urbo vekas unuflanke noblan kaj histoririĉan, aliflanke flegitan kaj priatentatan impreson. La stacidomo nuntempe estas en la manoj de metiistoj kaj travivas fazon de intensa renovi-

Zwischen den Quellen

Obwohl der Blick auf die Eisenbahnkarte eine fast bizarre Anzahl von Eisenbahnlinien um Bad Elster zeigt, ist die Anreise mit dem Zug nicht gerade leicht – jedenfalls nicht für uns Nordwestdeutsche. Es wären viele Umstiege mit unsicheren Anschlüssen erforderlich. Deshalb haben wir einen Teil des Wegs zum Ort des GEFA-Jahrestreffens im Sammeltaxi verbracht. Dieses Jahr war die Truppe vergleichsweise klein. Aber wie wir gehofft hatten, haben unsere tschechischen Freunde etwas geholfen, die Veranstaltung international zu machen und kamen auch, um für die Kongresse in Tschechien (UK in Brno) und der benachbarten Slowakei (IFK in Žilina) im kommenden Jahr zu werben.

Quasi einen Vorgeschmack vermittelte der Tagesausflug mit Bus und einem Triebwagen der Vogtlandbahn über die Grenze nach Františkovy Lázně. Die Stadt macht einerseits einen

gado. Sed la urbocentro kun siaj klasicismaj kaj belepokaj gastodomoj, fontakvaj trinkejoj kaj kurackatedraloj elradias ordan sezonfinan dignon. Kiel la hazardo volis, nia vizito koincidis kun la festo de la samjara vino, kiu estis okazo instali bazaron kun muziko kaj nutraĵofertoj, ekz. kolbasoj memrostendaj en lignofajro antaŭ la pordo. Por satiĝi ni ekskursantoj tamen strebis al ĉarma restoracio, rendevuis tie kun Andrea Švubová kaj amiko kaj post kelka tempo repromenis al la stacio – ne forgesinte duan fojon por foto pozi ĉirkaŭ la zamenhofa memorŝtono en la kuraca parko.



Peter kaj Ladislav rostas siajn kolbasojn.
Peter und Ladislav grillen ihre Würste.

Ne tiel impona kiel arkitektuta ensemblo estas Bad Elster mem. Sed ankaŭ ĝi havas siajn perlojn. Surprizas, ke urbeto kun eble 4.000 enloĝantoj posedas propran teatron. Dediĉita al la saksa reĝo Albert (kiu ĝin ne vidis), inaŭgurita de lia nevo Friedrich August (kiun ĝi ne interesis), tamen la teatra asocio rezervis por la aristokratoj apartan loĝion en la cetere „demokratia teatro“ kun ĉ. 500 sidlokoj. Dum origine ĝi estis oferto por la kuracgastoj, tiuj hodiaŭ nur okupas malpli ol trionon de la lokoj. Ĉiujn aliajn abonas loĝantoj de Bad Elster kaj la regiono.

La vesperaj horoj apartenis al informo kaj distro. Necesis prezenti al la ĉeestantaj GEFA-membroj la jarraporton de la centra grupestro. Unu ne nur fervojfaka prelego prilumis la tragikan sorton de la Frisia Ponto, alia la multajn apud- kaj translimajn fervojliniojn en Voktolando kaj Ercmontaro, kies funkcio ofte noblen und geschichtsträchtigen, andererseits einen gepflegten und betreuten Eindruck. Das Bahnhofsgebäude ist gerade in den Händen der Handwerker und durchlebt eine Phase intensiver Renovierung. Aber das Stadtzentrum mit seinen klassizistischen und Belle-Epoque-Gästehäusern, Quellwasser-Trinkhallen und Kurkathedralen strahlt eine ordentliche Würde zum Saisonabschluss aus. Wie der Zufall es wollte, traf unser Besuch mit dem Fest des ersten Jahrgangsweins zusammen, Gelegenheit für einen Markt mit Musik und Speiseangeboten, z.B. Würstchen zum Selbstbraten über einem Holzfeuer vor der Tür. Um satt zu werden, zogen wir Ausflügler aber in ein nettes Restaurant, trafen uns dort mit Andrea Švubová und ihrem Freund und spazierten nach einiger Zeit zum Bahnhof zurück – nicht ohne ein zweites Mal vor dem Zamenhof-Gedenkstein im Kurpark für ein Foto zu posieren.

Als architektonisches Ensemble nicht derart imposant ist Bad Elster selbst. Aber auch dieses hat seine Perlen. Es überrascht, dass ein Städtchen mit vielleicht 4.000 Einwohnern ein eigenes Theater besitzt. Gewidmet dem sächsischen König Albert (der es nicht gesehen hat), eingeweiht von seinem Neffen Friedrich August (den es nicht interessierte), hat die Theatergesellschaft den Aristokraten dennoch eine Loge reserviert im ansonsten „demokratischen Theater“ mit ca. 500 Sitzplätzen. Während es anfänglich ein Angebot an die Kurgäste war, besetzen diese heute nur weniger als ein Drittel der Plätze. Alle anderen abonnieren Einwohner von Bad Elster und der Region.

Die Abendstunden gehörten der Information und der Zerstreuung. Es war notwendig, den anwesenden GEFA-Mitgliedern den Jahresbericht des Zentralen Gruppenleiters vorzustellen. Ein nicht allein eisenbahnfachlicher Vortrag beleuchtete das tragische Schicksal der Friesenbrücke, ein anderer die vielen grenznahen und grenzüberschreitenden Eisenbahnstrecken in Vogtland und Erzgebirge, deren Betrieb oft unterstrichen hat, dass das

substrekis, ke teritorio kompare al topografio fakte estas duaranga afero – se ekzemple por ŝanĝi la pozicion de lokomotivo en germanflanka kapstacio ĝi devas transiri la limon.
Rigardo en estonton estis la invitoj al Žilina kaj Brno kaj la raporto pri la preparoj por la fervojista kongreso 2026 en Serbio. Kaj laste – ankaŭ principe seriozaj fervojistoj tion faras – eblis iom kanti.
Dum la ceteraj partoprenantoj ĝuis la sunlumigitan pejzaĝon aŭ memstare vizitis la najbaran Plauen, la estraro retiriĝis por plani la sekvan duonjaron. Intenco estas revizii kaj noveldoni varbilojn. La provizo de la gramatikaj bierfilcoj estas elĉerpita. Ili same kiel la informilo „Fervojistoj kaj amikoj de fervojo“ estas aktualigendaj enhave kaj adaptendaj al la nuntempa bildo de la fondaĵfamilio. La retpaĝoj de la fondaĵfamilio prezentas inter siaj diversaj sekcioj libertempaj kaj kulturaj ankaŭ la Esperanto-grupon. Necesas tamen ŝanĝi ankoraŭ kelkajn detalojn kaj aldoni informojn pri planitaj aranĝoj.
Plue la estraro intencas oferti propran semajnfinan Esperanto-kurson aŭ alternative propagandi tian de alia organizaĵo.
Konsiderante, ke la Germana Esperanto-Asocio ŝovis sian kongreson en 2025 al la aŭtuno por aranĝi ĝin komune kun la najbaraj belgoj, nederlandanoj kaj luksemburgianoj, GEFA ne okazigos apartan jarkunvenon sed preparos propran fervojan programkontribuon kaj rekomendos al siaj membroj partopreni la german-beneluksan kongreson 2-an ĝis 5-an de Oktobro 2025 en Schleiden-Gemünd.



František en vintra kostumo.

Guido Brandenburg

Territorium im Vergleich zur Topografie eher eine zweitrangige Bedeutung hat – wenn beispielsweise eine Lok die Grenze überfahren muss, um in einem Kopfbahnhof auf der deutschen Seite die Seite am Zug zu wechseln.
Ein Blick in die Zukunft waren die Einladungen nach Žilina und Brno und der Bericht über die Vorbereitungen zum Eisenbahner-Kongress 2026 in Serbien. Und schließlich – auch im Grundsatz ernste Eisenbahner machen das - konnte man ein wenig singen.
Während die übrigen Teilnehmer die sonnenbeschienene Landschaft genossen oder selbständig das benachbarte Plauen besuchten, zog sich der Vorstand zurück, um das folgende Halbjahr zu planen. Die Absicht ist, die Werbemittel zu überarbeiten und neu herauszugeben. Der Vorrat der grammatischen Bierfilze ist erschöpft. Sie sind ebenso wie das Info-Blatt „Fervojistoj kaj amikoj de fervojo“ inhaltlich zu aktualisieren und dem heutigen Außenauftritt der Stiftungsfamilie anzupassen. Die Internetseiten der Stiftungsfamilie stellen unter den verschiedenen Kultur- und Freizeit-Sparten auch die Esperanto-Gruppe vor. Erforderlich sind jedoch noch Änderungen einiger Details und die Ergänzung von Informationen über geplante Veranstaltungen. Weiter will der Vorstand einen eigenen Wochenend-Esperantokurs anbieten oder alternativ einen solchen einer anderen Organisation propagieren.
Mit Rücksicht darauf, dass der Deutsche Esperanto-Bund seinen Kongress 2025 in den Herbst geschoben hat, um ihn gemeinsam mit den belgischen, niederländischen und luxemburgischen Nachbarn zu arrangieren, wird die GEFA kein separates Jahrestreffen veranstalten, sondern einen eigenen Programmbeitrag vorbereiten und ihren Mitgliedern die Teilnahme am deutsch-benelux-Kongress vom 2. bis zum 5. Oktober 2025 in Schleiden-Gemünd empfehlen.

(trad. Brandenburg)



GEFA 02.-05.10.2025 en Schleiden Gemünd

En la jaro 2025 GEFA ne okazigos propran jarkunvenon sed rekomendas la german-beneluksan kongreson en la Eifel-montaro. Unu kaŭzo estas la amasigo de aŭtunaj aranĝoj, kiu minacas reciproke forlogi eventualajn partoprenantojn. Dua estas la ĉeesto de internacia esperantistaro – instiga por apliko de la lingvo. Tria estas la daŭra oferto de Germana Esperanto-Asocio al siaj fakaj asocioj ĉeesti kaj kontribui al la programo.
Schleiden Gemünd situas ĉe la rando de la nacia parko Eifel en belega kaj zorge protektita pejzaĝo kun kelkaj vizitindaj ekskursoceloj. La kongresejo estas nova junulargastejo Gemünd Vogelsang malfermita en printempo 2020. Disponeblaj estas 188 litoj en 56 ĉambroj. Sep kunvenejoj por maksimume 245 homoj ofertas komfortajn kunveneblojn.
La plej proksima fervoja stacio estas en Kall, kiu ĉiu duonhore estas priservata per regionaj trajnoj de Köln. Plue al Schleiden-Gemünd trafikas aŭtobuslinio aŭ transporta servo. Kiun volas organizi LKK.



Guido Brandenburg

GEFA 02.-05.10.2025 in Schleiden Gemünd

Im Jahr 2025 wird die GEFA kein eigenes Jahrestreffen anbieten, sondern den Deutschen - Benelux-Esperanto-Kongress in der Eifel empfehlen. Ein Grund ist die Häufung von Herbstveranstaltungen, die drohen, sich gegenseitig die Teilnehmer wegzulocken. Ein zweiter ist die Anwesenheit internationaler Esperantisten – anregend für die Anwendung der Sprache. Ein dritter ist das dauerhafte Angebot des Deutschen Esperanto-Bunds an seine Fachverbände, anwesend zu sein und zum Programm beizutragen.
Schleiden Gemünd liegt am Rand des Nationalparks Eifel in einer herrlichen und sorgsam behüteten Landschaft mit einigen Ausflugszielen, die einen Besuch wert sind. Das Kongresszentrum ist die neue Jugendherberge Gemünd Vogelsang, die im Frühjahr 2020 eröffnet wurde. Es stehen 188 Betten in 56 Zimmern zur Verfügung. Sieben Konferenzräume für bis zu 245 Personen bieten bequeme Sitzungsmöglichkeiten.
Der nächstgelegene Bahnhof ist in Kall, der alle halbe Stunde mit Regionalbahnen von Köln aus bedient wird. Weiter nach Schleiden-Gemünd verkehrt eine Buslinie oder der Transportservice, den das Vorbereitungskomitee organisieren will.

(trad. Brandenburg)

Achim Meinel 30.01.1940 – 19.08.2024



En Majo 1977 la centra laborrondo Esperanto en la kultura ligo de GDR aprobis la fondon de faka grupo fervojista. Ĝi fondiĝis en Novembro de la sama jaro. La esenca celo estis simila al tiu de la partnera asocio en okcidenta Germanio, la oferto de Esperanto kiel sencohavan libertempan okupon, flegi la kontaktojn al la fervoja sindikato kiel sociala organizo kaj kompreneble peri kontaktojn al fervojistaj kolegoj en eksterlando. Achim Meinel gvidis la fakgupon de ĝia komenco ĝis la kunfandiĝo kun GEFA en la jaro 1992 kaj zorgis por vigla laboro.

Ankaŭ en la komuna organizaĵo li transprenis estraran respondecon kaj post retiriĝo de Rolf Terjung en komenco de 2007 fariĝis BSW-ĉefkomisiito por Esperanto – alivorte prezidanto de GEFA, kiu li restis dek jarojn ĝis la transdono de la torĉo al Bodo Ehrlich en Januaro 2017.

En lia oficperiodo GEFA aranĝis la Internacian Fervojistan Kongreson en Herzberg kaj multajn naciajn renkontiĝojn. Li forlasis 2018 la asocion kaj ankoraŭ aktivis kiel esperantisto en regionaj organizaĵoj.

La morto de Achim Meinel forprenis el nia mezo iniciateman kaj laboreman esperantiston kaj fervojan kolegon.



Guido Brandenburg

Im Mai 1977 stimmte der Zentrale Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR der Gründung einer Eisenbahn-Fachgruppe zu. Sie gründete sich im November desselben Jahres. Das wesentliche Ziel ähnelte dem der Partnervereinigung in Westdeutschland, das Angebot von Esperanto als sinnvolle Freizeitbeschäftigung, die Pflege der Kontakte zur Eisenbahner-Gewerkschaft als sozialer Organisation und natürlich die Vermittlung von Kontakten zu Eisenbahnerkollegen aus dem Ausland. Achim Meinel leitete die Fachgruppe von ihrem Beginn bis zu ihrer Vereinigung mit der GEFA im Jahr 1992 und sorgte für eine lebhafte Arbeit. Auch in der gemeinsamen Organisation übernahm er Vorstandsverantwortung und wurde Anfang 2007 nach Rückzug von Rolf Terjung BSW-Hauptbeauftragter für Esperanto – mit anderen Worten Vorsitzender der GEFA, der er zehn Jahre blieb, bis zur Übergabe der Fackel an Bodo Ehrlich im Januar 2017. In seiner Amtszeit richtete die GEFA den Internationalen Eisenbahnerkongress in Herzberg und viele nationale Treffen aus. Er verließ 2018 die Vereinigung und war als Esperantist noch in regionalen Organisationen aktiv.

Der Tod von Achim Meinel hat einen initiativen und fleißigen Esperantisten und Eisenbahner-Kollegen aus unserer Mitte genommen.

(trad. Brandenburg)

Reinhard Fößmeier 11.04.1955 – 05.11.2024



Reinhard aliĝis al nia asocio kiel amiko de fervojo. La partopreno en nia rondo estis plia pruvo, ke esti specialisto ne signifas unuflankan fokusigon. Studinte matematikon kaj informadikon li okupiĝis pri modeloj kaj solvoj en elektitaj programlingvoj, esploris kaj instruis – ankaŭ en Esperanto - en diversaj altlernejoj, kiel sendependulo kaj por diversaj komisiantoj. Sed tio estis nur unu flanko. La alia estis nelacigebla produktemo, el kiu rezultis centoj da vikipediaj kontribuoj, tradukoj, mem verkitaj libroj kaj tekstkontribuoj el fontoj kiel Nikolao Kopernikus, Ludwig Boltzmann, Arthur Conan Doyle aŭ la papo Gregor. Proprajn tekstojn li kutimis spici per kaŝita humuro. Kiu memoras liajn instrukciojn manĝi bavarajn blankajn kolbasojn, scias kion mi celas.

Pri sia malsano li eksciis antaŭ eble kvin jaroj, ankaŭ pri la prognozo. La konscio instigis lin esti ankoraŭ pli agema, produkti, partopreni, vojaĝi kaj elĉerpi la malkreskantajn resursojn.

Lia morto forprenis de ni bonan amikon kaj multjaran akompananton. Kvankam li ĉiam admonis, ke ĉiu kalkulu pri tio, ni postrestas konsternitaj kaj funebraj. Ni sincere kondolencas al lia familio.



Guido Brandenburg

Reinhard trat unserer Vereinigung als Freund der Eisenbahn bei. Die Teilnahme an unserer Runde war ein weiterer Nachweis, das Spezialist zu sein keine einseitige Fokussierung bedeutet. Nach dem Studium von Mathematik und Informatik befasste er sich mit Modellen und Lösungen in ausgewählten Programmiersprachen, lehrte und forschte – auch in Esperanto – an verschiedenen Hochschulen, als Unabhängiger und für verschiedene Auftraggeber. Das war aber nur eine Seite. Die andere war eine unermütliche Produktivität, aus der sich hunderte von Wikipedia-Beiträgen, Übersetzungen, selbst verfasste Bücher und Textbeiträge ergaben, aus Quellen wie Nikolaus Kopernikus, Ludwig Boltzmann, Arthur Conan Doyle und Papst Gregor. Eigene Texte würzte er gewöhnlich mit verstecktem Humor. Wer sich an die Anweisungen zum Verzehr bayrischer Weißwurst erinnert, weiß was ich meine.

Von seiner Krankheit erfuhr er vor vielleicht fünf Jahren, auch von der Prognose. Das Bewusstsein veranlasste ihn, noch aktiver zu sein, zu produzieren, teilzunehmen, zu reisen und seine abnehmenden Ressourcen auszuschöpfen.

Sein Tod hat uns einen guten Freund und langjährigen Gefährten genommen. Obwohl er immer mahnte, alle sollten damit rechnen, bleiben wir erschüttert und traurig zurück. Wir drücken seiner Familie unser tiefes Mitgefühl aus.

(trad. Brandenburg)

Sebastian Kirf 01.06.1977 – 09.10.2024



Sebastian Kirf pro hazardo trovis Esperanton. Li legis pri la fascina projekto dum restado en Finnlando en la jaro 2002 kaj post mallonga tempo de lernado komencis ĝin mem instrui. Siajn altlernejajn studojn pri socia laboro kaj socipedagogio kaj la esencajn ekzamenajn verkojn li ligis al la objekto da la internacia lingvo Esperanto. Ekde 2007 li laboris en la estraro de Germana Esperanto-Asocio, de 2013 ĝis 2017 kiel prezidanto. Dum tiuj jaroj spontaneaj, ideoriĉaj, agemaj li instigis multajn ŝanĝojn en la organizaĵo, multajn komencitajn, multajn realigitajn. Ankaŭ post sia retiriĝo pro malsano el la oficoj de GEA Sebastian instruis kaj lerte propagandis Esperanton. 2015 li membriĝis en GEFA por subteni kaj observi nian agadon.

Lia subita, terure frua morto en aĝo de nur 47 jaroj estas ŝoko por ĉiu, kiu lin iam renkontis.

Ni tutkore kondolencas la lia familio.

Sebastian Kirf fand durch Zufall zum Esperanto. Er las von diesem faszinierenden Projekt im Jahr 2002 während eines Aufenthalts in Finnland und begann, es nach einer kurzen Zeit des Lernens selbst zu unterrichten. Seine Hochschulstudien der Sozialen Arbeit und Sozialpädagogik und die wesentlichen Prüfungsschriften verband er mit dem Objekt der internationalen Sprache Esperanto. Von 2007 an arbeitete er im Vorstand des Deutschen Esperanto-Bunds, von 2013 bis 2017 als Vorsitzender. Während dieser spontanen, ideenreichen und aktiven Jahre veranlasste er viele Veränderungen in der Organisation, viele begonnene, viele umgesetzte. Auch nach seinem krankheitsbedingten Rückzug aus den Ämtern des DEB unterrichtete Sebastian Esperanto und propagierte es geschickt. 2015 trat er der GEFA bei, um sie zu unterstützen und ihre Arbeit zu verfolgen.

Sein plötzlicher, entsetzlich früher Tod im Alter von nur 47 Jahren ist ein Schock für jeden, der ihm einmal begegnet ist.

Wir kondolieren der Familie von Herzen.

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**

UN

Vidalvide al la danĝero
de neinversigeblaj medidamaĝoj
manko de kompleta scienca certeco
ne servu kiel senkulpigo
por prokrasti rimedojn,
kiuj pravigatas pro si mem.

Nula Horo „Daŭripove tra la disciplinoj“, 143, Wolfgang Günther

UN

Angesichts der Gefahr
unumkehrbarer Schäden an der Umwelt
sollte das Fehlen einer vollständigen
wissenschaftlichen Sicherheit
nicht als Entschuldigung für das Verzögern
von Mitteln dienen, die um ihrer selbst willen
gerechtfertigt sind.

Nula Horo „Nachhaltig durch die Disziplinen“, 143, (trad. Guido Brandenburg)



Stabila flankpozici(ig)o ĉe personoj kun perturbita konsci(ec)o

La malsupra gambo rekta.
La supra gambo anguligata je 90 gradoj en la kokso kaj la genuo.
La malsupra brako iom kapen superetendigata en la ŝultro kaj iom fleksata en la kubuto.
La supra brako tiel, ke la antaŭbrako kuŝas sube de la kolo.
La kapo nuke superetendigata.
La malfermita buŝo alteren.
La malfermita buŝo devas esti la plej profunda parto de la korpo.
(La buŝo devas esti malplena de fremda materialo.)

Nula Horo „Daŭripove tra la disciplinoj“, 205, Wolfgang Günther

Stabile Seitenlage(rung) bei Personen mit Bewusstseinseintrübung

Unteres Bein gerade.
Oberes Bein in Hüfte und Knie 90 Grad gebeugt.
Unterer Arm und Schulter leicht kopfwärts gebeugt.
Oberer Arm so, dass der Unterarm unter dem Hals liegt.
Kopf im Nacken überstreckt.
Mit offenem Mund zum Untergrund.
Der geöffnete Mund als tiefster Punkt des Körpers.
(Der Mund muss frei sein von Fremdkörpern.)

Nula Horo „Nachhaltig durch die Disziplinen“, 205, Wolfgang Günther

Redaktofino por FE 01/2025 estos la 15.02.2025	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:	
Nomo	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12

Redaktionschluss für FE 01/2025 ist der 15.02.2025	
Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redaktion:	Guido Brandenburg
Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefon:	02508-9107
E-Mail:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Beitragskonto:	
Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE
Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Name	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12